**N I A   V O Ĉ O**
Madrid Esperanto-Liceo
San Alejandro 6-4ºB-Ext. 28005 Madrid
(Nur poŝta adreso)
Ni kunvenas lunde je la 18,30 en Rodríguez San Pedro 13-3º-7

Redaktas kaj eraras: Lupe Sanz NOVEMBRO 2001

## SEGOVIO VIGLAS

La 22an de majo prezentis ĝiajn statutojn al la regiona registraro la nova E-asocio de Segovio "Asociación Cultural Esperantista Segoviana "César de Mosteyrín", memore al la forpasinta dojeno de la esperantismo en la kastilia urbo. Adreso: SEA, Avda. Obispo Quesada 14-6ºD. 40006 Segovia. <pavivalan@terra.es>

## DATUMOJ SER ĈATAJ

La projekto "Filozofio en la hispana" (www.filosofia.org) aperigos la plenan tekston de libreto de Manuel M. Burgos "Un idioma para el mundo proletario: el esperanto" eldonita en la libroserio "Cuadernos de Cultura" en 1933. La gvidanto de la projekto petas helpon de la esperantistoj por informiĝi pri la biografio de la aŭtoro.

## REELDONO DE "Nuevo método de esperanto"

Prezo: 7,52 EUR (1.250 ESP) inkludas impostojn sed ne sendokosto.
Rabato: 20% se vi aĉetas pli ol 10 ekzemplerojn.
Petu al:
Esperanto Liceo de Madrid
San Alejandro 6 4ºB-EXT
28005 Madrid
Tel/fax 91 446 80 79
admin@esperanto-es.net

## ESPERANTO EN HISPANIO

En julio okazis en **Valencio** la tria parto de la 11ª Eŭropa Esperanto-Forumo" sub la temo "Naturprotektado en Suda Eŭropo". Partoprenis 200 homoj, inter ili multaj eksterlandanoj.

La 30an de septembro la elstara esperantisto kaj verkisto Salvador Gumà centjariĝis. Tial lia libro "Kiam floras la timianoj" estis prezentata en **Reus** (Tarragona) kadre de omaĝo organizata de KEA kun kunlaboro de KAE .

Jorge Camacho ne plu membras en la Akademio de Esperanto,ĉar li demisiis la 14an de aŭgusto 2001.

Esperantista Renkontiĝo en **Guardamar del Segura** (Alicante) okazis organizita de la samideanoj de Callosa de Segura, kun tre agrabla etoso, kun abundo da senpagaj manĝaĵetoj kaj malvarmaj trinkaĵoj. Eblis babiladi en Esperanto, interŝanĝi somerajn travivaĵojn kaj informojn pri la diversaj kongresoj. Inter la plej interesaj eroj de la renkontiĝo troviĝis la kunveno por pritrakti la organizadon de la venonta SAT-kongreso, kiu okazos en la proksima urbo Alicante, dum la jaro 2002. Partoprenis la renkontiĝon samideanoj el la provincoj Alicante, Valencia, kaj de la najbara regiono Murcio, krom ukraina samideanino kaj pakistana samideano.

La Generalitat de **Katalunio** akceptis publikigi turisman propagandan broŝuron en Esperanto. Faris la tradukon S-ro Hernández Llusura.

Majorka Esperantistaro jam havas leĝajn regulojn. La celo de la asocio,laŭ statutoj, estas propagandi la internacian lingvon kaj omaĝi almenaŭ unufoje ĉiujare la esperantistajn martirojn kiuj estis murditaj dum la militribelado okazinta en lajaro 1936. La Asocio eldonas "Bulteno de la Majorka Esperantistaro" kies adreso estas: Apartat 2. 07110 Bunyola. http://majorka.8m.com/main.html

La pasintan marton estis legata en la Universitato de Baleara Insularo la doktoriga tezo "Esperantista movado en Majorko. 1898-1938", verkita de Xavier Margais Basí.

En Studenta Restadejo kiu apartenas al la Universitato Carlos III, en **Colmenarejo** (Madrido), Aníbal Rodríguez gvidis parolrondon pri Esperanto.

**RABAL, ESPERANTISTO**

Ne temas pri Paco la fama forpasinta aktoro sed pri lia frato Damián. Intervjuo al Paco publikigita en "El País (2001-08-31). *P. ¿Qué te hizo querer saber más?. R. Tenía, no se por qué una inquietud natural. Y además el ejemplo de mi hermano Damián, que era un muchacho muy inquieto y leía mucho. Hasta se escribía con un ruso en esperanto. Yo le imitaba la caligrafía, los libros que leía, y muchas veces no entendía nada de las lecturas, pero algún poso quedaba.*

**ESPERANTO EN LIBROJ**

La verko "Ra" de la norvega Thor Heyer mencias Esperanton (paĝo 42): "parecía una nota de aviso de terror hipnótico emitido en una especie de esperanto natural…."

**NOVA UEA-ESTRARO**

Post la lasta elektoj, estis nomumita la nova UEA-Estraro, kiun konsistigas aro da kompetentaj kaj spertaj homoj, kiuj certe kondukos UEA-n al nova brila epoko. La nova Prezidanto, de longe UEA-estrarano, Renato Corsetti, itala, antaûa vicprezidanto, respondeculo pri la Kampanjo 2000, kaj de la Strategia Plano, akademiano, montris ĉiam sian kompetentecon kaj laboremecon. Nova Vicprezidanto estas Humphrey Tonkin, kiun ĉiuj rememoros dum lia etapo kiel UEA-prezidanto.

**HEF ANGULO**

**NOVA DEĴOR-HORARO**. Lunde kaj ĵaŭde MATENE (9,00-13,00), vespere (18,00 ĝis la 20,30 h) funkcias HEF-CO (Rodríguez San Pedro 13-3º-7). Aliajn tagojn kaj horojn uzu aŭtomatan respondilon aŭ fakson 91 446 80 79. Ankaŭ e-poŝto: admin@esperanto-es.net

Anstataŭ la likvidita libroservo de HEF, oni povas mendi librojn al S-ro Luis Serrano Pérez. Font Nova 32. 08202 Sabadell. Tel. 937 275 021. <luis_serrano@e-milio.es>. Por pagi: Per poŝta ĝiro, aŭ al konto 0081 0900 82 0006712480, Banco de Sabadell, je la nomo de L. Serrano. Se oni sendas banko-ĉekon aldonu 1,5 EUR por bankaj elspezoj.

**ESPERANTO EN AMAS-MEDIOJ**

www.radiohc.cu Radio La Havana havas programon en esperanto dimanĉe je la 15a horo utc pere de REal Audio.

**VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO**

Niaj konversaciaj rondoj okazas ĉiu-lunde, ekde la 18.30 h, en RODRÍGUEZ SAN PEDRO 13-3º-7 Tel. 91 446 80 79.

Lumbildoj: 19-a de novembro. "Madrido…..je la komenco estis la rivero".

**KONGRESOJ KAJ RENKONTIĜOJ**

SAT-kongreso por la jaro 2002, kiu okazos en Alicante (Hispanio) ĉe bela marbordo, 1-7 julio.

::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::

ESPERANTO LICEO DE MADRID
San Alejandro 6-4ºB. Ext
28005 Madrid
Asociación de Utilidad Pública Municipal